

bulgara esperantisto

MONATA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekom. de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II, 1938

Adreso: Denkoglu 11 — Sofia

5-6

JARO XXIII

S O F I A

Majo—Junio 1942



La romantika insulo Thasos

NIA INTERNA DISCIPLINO

Ni ofte ŝatas paroli pri la esperantista regno kaj popolo, pri Esperantujo, pri nova mondo kaj kulturo, pri unuigita homaro... Eble en la estonteco tiuj ĉi vortoj ekposedos realan sencon kaj enhavon. Ni firme **esperas**, ke ili baldaŭ fariĝos karno kaj sango, same kiel la dia Vorto aŭ Ideo (Logos), pri kiu atestas la evangeliisto sankta Johano... Sed hodiaŭ ilia signifo estas nur simbola, figura.

Efektive, la sociaj bazoj, la politikaj kaj ekonomiaj fundamentoj de nia „popolo“ ŝajnas esti ne sufiĉe stablaj, eĉ tre ŝancelemaj. Ĉiuj aliaj popoloj kaj nacioj posedas potencajn ŝtatajn aparatojn, organizaĵojn kun aŭtoritataj registaroj, administracioj, armeoj, policoj ktp., kies organoj intervenas ĉiam, kiam la vivon de la kolektiva organismo, ĝian politikan unuecon, ĝiajn komunajn ekonomiajn aŭ kulturajn interesojn ekminacas ia danĝero. Ĉiuj modernaj ŝtatoj ellaboris severajn leĝojn, uzante devigojn, punojn kaj sankciojn kontraŭ tiuj, kiuj malobeas iliajn postulojn. Ili kreis malliberejojn, leĝigis la perforton, eĉ starigis eŝafodojn, por sin defendi kontraŭ siaj internaj malamikoj. Ili edukigis soldataron, instruigis oficirojn, konstruigis fortikaĵojn, fabrikigis armilojn por batali kontraŭ siaj eksteraj malamikoj kaj por defendi sian teritorion aŭ sian nacian honoron. La objektivaj cirkonstancoj de la medio kaj de la momento, la bezono kompreniĝi kun siaj kunuloj devigas ties civitanojn konstante paroli, uzu sian gepatran nacian lingvon. Certe, lingvoj kaj kulturoj povas ekzisti sen ŝtatoj, sen liberaj teritorioj kaj sen armitaj fortoj. Ankaŭ popoloj kaj nacioj povas longe vivi sen ŝtata organizo, administracio, sen libera lando, sen armeo. (Ja la bulgara popolo dum sia kvincentjara jugo posedis nek ŝtaton, nek liberon, nek soldataron, nek administracion. Ankaŭ nun la armena kaj la hebrea popoloj ne posedas tiujn ĉi atributojn). Sed tiuj lingvoj, kulturoj kaj popoloj havas longan historian pa-

sintecon, iliaj civitanoj loĝas en kompaktaj masoj, posedas komunajn tradiciojn, folkloron, kutimojn kaj ofte estas eĉ organizitaj en grandaj kaj potencaj naciaj asocioj. Komunaj politikaj kaj ekonomiaj interesoj kaj multaj aliaj lokaj cirkonstancoj stimulas la rasan senton de la loĝantoj, devigas ilin obei la nacian disciplinon kaj eĉ instigas ilin batali por la kultura unueco de sia gento.

Tute alia estas la situacio en Esperantujo. La esperantista popolo havas nek ŝtaton, nek registaron, nek policon, nek armeon. Neniu deĵoras pri ĝia politika aŭ spirita (idea) unueco, neniu persekutas ĝiajn internajn malamikojn aŭ malhelpantojn, armitaj fortoj ne defendas ĝiajn materiajn aŭ kulturajn interesojn. Nenia ŝtata potenco, nenia internacia aŭtoritato zorgas sisteme kaj laŭplane por ĝia sekuro, kreskado kaj prospero. La disvastiĝo de ĝia lingvo, ideo kaj movado okazas iel hazarde. La esperantista popolo ne obeas alian leĝon krom la leĝon de la etiko, de la nedeviga aliĝo kaj de la plena libero. La esperantistojn, por iliaj krimoj aŭ neplenumitaj devoj al la movado, minacas neniu puno, neniu sankcio, krom la sankcio de ilia maltrankvila esperantista konscienco. Iliaj devoj estas nur moralaj. Neniu leĝo aŭ dekreto ordonas al ili paroli Esperanton. Male, ĉiuj objektivaj cirkonstancoj de la ĉirkaŭa medio ilin instigas uzi ne Esperanton, sed sian gepatran nacian lingvon: en la magazeno, en la oficejo, en la fabrikejo, sur la strato, en la lernejo... La plejmulto de niaj adeptoj aŭ loĝas izole, aŭ estas miksitaj kun kompakta neesperantistaj homamasoj kaj nur malofte, hazarde trovas okazon paroli Esperanton, pripensi esperantistajn aferojn, senti sin kiel esperantistoj. Nia internacia popolo havas nek longan historion, nek gloran pasintecon. Ĝin ne unuigas komuna sango. Folkloro, tradicioj, kutimoj, ne ankoraŭ efektive ĝian kulturan unuecon kaj la vivbatalo ne ankoraŭ determinis la originalecon de ĝia karaktero. Male nia

esperantista popolo konsistas el plej heterogenaj, el plej buntaj elementoj naciaj, rasaj, sociaj kaj religiaj. La ekonomiaj kaj politikaj interesoj de ĝiaj „civitanoj“ estas plej diversaj, diverĝemaj, ofte diametre kontraŭaj. Iliaj kulturaj kaj spiritaj bezonoj ŝajnas ankaŭ tute malsamaj. Neniaj landlimoj, neniaj fortikaĵoj kaj kasteloj, nenia heroa pasinteco memorigas al ili pri komuna deveno, pri parenca sango aŭ pri naciaj interesoj.

La komuna idea kaj lingva bazo estas sola ligilo, kiu koherigas la dispecigitajn kaj dissemitajn tra la tuta terglobo partojn de nia artefarita popolo. Tiu ĉi nemateria bazo determinas nian esperantistan konduton. Ĝi estas la sola leĝo kaj stimulo, kiu instigas nin plenumi niajn esperantistajn devojn. Ĝi tamen havas ne juran, sed nur moralan signifon, implikante nek punojn, nek sankciojn. Ĝi do estas nedeviga, (simila al ĉiuj moralaj leĝoj aŭ ordonoj) kaj ĉiuj esperantistoj malsame ĝin komprenas kaj aplikas.

Ĉiu ajn facilanima persono, nur se ĝi metas en sian kapon la ideon malutili al nia afero, precipe se ĝi havas iom da ruzo, da malico, iom da mono aŭ da politika influo, povus senpune kaŭzi nekalkuleblajn damaĝojn al la Esperanto-movado. La sorto de la esperantismo, de la plej nobla idealo Zamenhofa, dependas do de la kaprico de iu ajn hazarda fripono, kiu, aŭ pro personaj motivoj (jaluzo, ambicio, detruemo ktp.), aŭ pro instigo kaj monpago flanke de interesigitaj personoj, klikoj, organi-

zaĵoj aŭ registaroj, povus facile nenigi nian movadon. La malnovaj esperantistoj bone memoras la katastrofon, kaŭzitan de kelkaj ambiciaj kaj facilanimaj aventuristoj al nia afero dum 1912. La danĝero de similaj aventuroj ankoraŭ ne estas forigita kaj ĉiam persistas. Ĝi persistos, eĉ se iu ŝtato oficialigos nian lingvon.

Kiel do lukti kontraŭ tiu ĉi konstanta danĝero?

Plej efika rimedo por asekuri nian movadon kontraŭ tiaj surprizoj estas la **kreo de granda, forta, kompakta kaj spirite unueca esperantista popolo**. Kiam nia movado fariĝos grandskala organizaĵo, kiam ĝi enradikiĝos forte en la profundajn tavolojn de la popolmasoj, kiam la idea solidareco de ĝiaj adeptoj kreos nerompeblan spiritan ligilon inter ili — tiam neniu materia forto, neniu persono aŭ registaro, neniu tera potenco aŭ homa volo povos ŝanceligi ĝiajn fundamentojn. Ĝis tiam ni devas labori senbrue, paciencie, kun seninterrompe streĉitaj fortoj. Dum tiu ĉi konstrua kaj prepara periodo, dum kiu la danĝero de skismoj, perfideco kaj disfalo fatale persistos, la sorto de nia movado dependos ekskluzive de la fideleco kaj bonvo'o, de la agemo kaj entuziasmo de ĝiaj adeptoj. Pro tio ni devas **unue prizorgi nian internan disciplinon**. Ĝi estas pli grava ol ĉia propagando, ol ĉiaj bruaj manifestacioj kaj oficialaj rekonoj. Ĉiuj niaj penadoj, la tuta nia kultureduka kaj literatura agado devas celi la spiritan (idean) unuecigon de la Esperanto-movado.

D-ro St. Ĝuĝev

TRIBUNO DE LA PIONIROJ

Ni en la nova ordo

I.

Malgraŭ ke certaj medioj provadis ligi Esperanton al certaj politikaj aŭ ideaj doktrinoj kaj tiamaniere kunligi ambaŭ sortojn, ni estas ĉeestantoj de la fenomeno, ke ankaŭ dum dekadenco de tiuj doktrinoj, Esperanto daŭrigas sian vivon,

sian progreson. Tamen ni devas konfesi, ke tiaj kunligoj ne restis sendamaĝaj por la esperantismo — nome la tro fervora akcentado de la interna ideo ĝis ia aparta kulto, de la homamo, de la abstinenco kaj vegetarismo, de la aparteno al certa partio k. t. p. Tia malutilo estis

ebla pro la jenaj kaŭzoj: Unue, ĉar tia rekolorigo de Esperanto forpuŝadis de ĝi multajn ceterajn ĝiajn ŝatantojn, kiuj ne apartenis al la dominanta ismo, kaj tio malutilis al ĝi (al Esperanto) kaj al ĝia universaleco, limigante ĝiajn adeptojn; tiu ĉi fakto pruvas, ke Esperanto devas esti adaptebla al ĉia ordo kaj historia momento, se nur ĝiaj adeptoj ne estus tro dogmemaj; sed eĉ en tia okazo aperos novaj personoj kun pli largaj konceptoj, liberigante Esperanton de la superstiĉoj de siaj antaŭuloj. Due, ĉar ofte la supremenciitaj tendencoj luktis inter si aŭ kun aliaj, faladis au perdis sian ravforton al la masoj, kaj kune kun si trenis ankaŭ Esperanton al la abismo, aŭ skuis la malfacile kreitan respekton al ĝi. La supra fakto devos resti jam por ĉiam nia bona ekzemplo.

Ĉio ĉi pruvas, ke Esperanto devas esti adaptebla al ĉiu ordo kaj ke ni devos liberigi ĝin de ĉiuj apartaj ideologioj, trakti ĝin, tiel diri, teknike, nur kiel internacian helpan lingvan kaj tiel unuigi ĉiujn esperantistojn sur la plej larĝa fundamento. — Esperanto estas por ĉiuj, kiuj bezonas ĝin.

II.

Feliĉe la supremenciitaj malutiloj al Esperanto, kvankam ke tio ĉi ŝajnas iomete absurde, havas ankaŭ utilan efikon al ĝi: ili kaŭzas certan repurigon de la esperantismo, renovigas ankaŭ ĝiajn adeptojn, estigas ian ĝeneralan refreŝigon, tre utilan kaj kontraŭstagnan.

En la ideoj pri la Nova Eŭropo, en kiuj superas la zorgo pri sociala justeco, sendependeco kaj memstara kulturevoluo de la apartaj popoloj, Esperanto trovas favoran grundon, ĉar sole ĝi helpas la

plej rapidan triumfon de la jena principo, kunligante kaj senpere interkomprenigante la apartajn popolojn. Propagandi la ideojn pri Nova Eŭropo kaj embarasi la utilan kulturrolon de Esperanto, signifus malsinceron, ĉar en tia okazo sub la ŝajna, ekstera triumfo de la justeco, ni trovus kaŝitan deziron por hegimonia de certa nacio super la ceteraj. Tamen ni tion ne kredas ĉar la pioniroj de la nova ordo ne estas hipokritoj.

La novaj totalitaraj reĝimoj batalas kontraŭ la plutokrataj sistemoj, iliaj doktrinoj koncernas la popolajn masojn. Ili batalas por nova ordo kaj nova pensmaniero ne nur en la limoj de unu sola popolo, sed koncerne multajn popolojn en Eŭropo, eĉ en la mondo. Post la supraj du premisoj, oni povas konkludi, ke Esperanto des pli estas necesa nun ol antaŭe.

Ni estas atestantoj de diversaj internaciaj amikaj, profesiaj, ekonomiaj kaj kulturaj renkontoj ne nur de intelektuloj kaj oficialaj personoj, sed ankaŭ de reprezentantoj de la popoloj mem kaj de la gejunularoj. Certe, sen la helpo de Esperanto ilia amuzo aŭ laboro restus rigida kaj nur ŝajna, ĉar ĉiuj ĉi homoj ne povas koni la lingvojn de tiom da diversaj amikaj popoloj, interalie de la japanoj!

Nun, almenaŭ koncerne Bulgarujon, la maniero de la redaktado de nia gazeto kaj de la radiodisaŭdigoj en Esperanto pruvas ke Esperanto perfekte povas servi al la nova spirito, estante efektive nur dua helpa lingvo, post la gepatra, de ĉiuj progresemaĵoj homoj sur la klarigita larĝa bazo, ne koncernante iliajn apartajn gustojn kaj ideojn.

Do nia konvinko estas, ke ni povas ekzisti kaj agadi ankaŭ en la nova eŭropa ordo.

L. Marikin

La junuloj renovigos nian movadon

Unu el la gravaj demandoj, kiujn diskutis nia 27 nacia Esperanto-kongreso, estis la demando pri la partopreno de la virinoj en nia movado.

Ke la virino partoprenas egale kun la viro en ĉiuj iniciatoj en la batalo por

kulturo kaj homeco, superflue estas skribi. Nur la konservativaj rondoj povas aserti malon. La demando estas, ĉu ni faris ion, por altiri la virinon en la Esperantomovadon. Se ni juĝas laŭ la ĝisnunaj rezultoj, ni devas konfesi, ke la faktoj es-

tas malĝojaj. Eĉ la Esperanto-societo de Varna, kiun oni montras kiel ekzemplon pri fervoro kaj agemo, ne donis grandajn rezultojn en tiu ĉi direkto.

Ni ne devas serĉi la kaŭzojn ekster nia organizaĵo. Ni ne devas senkulpigi nin, ke mankas intereso al Esperanto inter la virinoj kaj speciale inter junaj knabinoj. Vere, ekzistas eksteraj faktoroj, kiuj influas la spiriton kaj la tradiciojn de la esperantismo. Sed tiuj faktoroj estas egalaj por ni ĉiuj. Aliloke, en ni mem, ni devas serĉi la kaŭzojn pro kiuj virino ne partoprenas en la Esperanto-movado.

Multaj amikoj, alie bonaj esperantistoj, ankoraŭ ne povas liberiĝi el la sektaneco, kaj ili tiamaniere mortigas la inte-

reson pri Esperanto ne nur inter la knabinoj, sed ankaŭ inter la knaboj.

Nia organizaĵo estas amasa, sed ni devas konfesi, ke iuj rigardas al ĝi apenaŭ kiel al sekto.

Ni devas renovigi nian movadon, interesi pri ĝi la junajn geknabojn kaj instigi ilin al studo de Esperanto. Jen estas unu el niaj gravaj taskoj. Ni povus organizi verdajn ekskursojn ekster la urboj kaj vilaĝoj, inviti ankaŭ neesperantistajn gejunulojn kaj klarigi al ili la utilon de Esperanto. Tie ni racie profitigos la tempon, por plifortigi la intereson al la internacia lingvo kaj por ĝin instrui al la gejunuloj.

Marŝante ŝultro apud ŝultro ni plialtigos ankaŭ nian entuziasmon.

Dim. G. Ivanov

ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA BULGARA LITERATURO

Preĝo

de *Teodor Trajanov*

Ho Dio, ne aŭskultu,
ne aŭdu, Di' potenca,
buŝ' kiel vin insultas
dum ĉi timiga hor'!
Enmetis sort' malsava
vokvortojn ĉi sensencajn
de lingvo fremda, sklava
en mia stulta plor'.

Ho Dio, ne aŭskultu —
kaj mi, kaj mi mutiĝos,
el mia buŝ' adulta
eliros preĝparol';
animon ne rigardu,
ĉar ĝi abismo iĝis,
kaj tie larmoj ardas
de tuta vepopol'.

Ho Dio, ne aŭskultu
la kriojn de la kulpoj,
sed aŭdu: plendas multe
en plagoj fraton frat'.
Eltiru el la koroj
de la terur' rezultojn
ĉar tremas ni ankoraŭ
de via fajra bat'.

Ho Di', kompaton donu
al la patrin' paganta,
apud la idaj tomboj,
kelkies pekon nun —
aŭskultu kaj komprenu
suferon ŝian sanktan
kaj sendu Vian benon
al la adora frunt'!

Al Via fil' malpaca
rideton mildan sendu,
al Via sklav' donacu
sciigon kun esper'!
Soifa grund' radion
kaj akvon jen atendas!
Potenca, savu vian
vefilon el malver'!

Mi, Dio, antaŭsentas,
ke ĉi momento grandas,
ĉar Via man' atenta
ja gardas zorge min!
Animo ke ekbrilu
per vortoj fajrflamantaj,
sentestamentan filon
elgvidu ĝis la fin'!

Morto en la ebenaĵoj

de *Teodor Trajanov*

Mi kuŝas senmovebla, sola,
la vundo ŝprucas sangon, jen,
nek voĉ' malklara, nek konsola,
kaj nur nubegoj malheligos
la ebenaĵon per ĉagren: —
Ho ve, min kiu enterigos!

Ne aŭdas mi arbaran ĝermon,
ne ekblovetas milda ond',
nek nimfoj apud mi postenas,
ne ploras noktaj paserstrigoj,
nek la malĝoja luna rond': —
Ho ve, min kiu enterigos!

Vi kion nun ensonge vidis,
do, panjo? — ĉu ekfalis stel'?
Jam kial meznokt' ne eksidis? —
Mi vokas ombrojn la timigajn
de miaj avoj el ĉiel'! —
Ho ve, min kiu enterigos!

Alblovu sanktan grundon, vento,
el naskangulo el la nord! —
malvarman kison, jen, mi sentas,
katenoj premas min, pezigas
palpebrojn frostajn jam la mort! —
Ho ve, min kiu enterigos!

tradukis: *St. Kiraĝiev*

GEORGI TOMALEVSKI

Alaho estas bona kaj kompatema

Georgi Tomalevski estas talenta nuntempa bulgara novelisto kaj eseisto. Naskita en Kruŝevo, vera filo de Makedonia, li apartenas al la generacio de la plej novaj verkistoj. Gimnazia profesoro pri fiziko en Sofia, li lerte unuigas la sciencan kun la belarto. Liaj sciencaj prelegoj distingiĝas per artistika stilo kaj formo kaj liaj literaturaj verkoj estas penetritaj de naturfilozofiaj ideoj. Tomalevski havas spiritualistan mondkoncepton. El liaj paĝoj blovas parfumo de homamo, kosmopolitismo kaj pura idealemo. Lia religio estas la Vero, lia kulto — la Beleco, lia patrujo — la Mondo. Depost 1926, kiam aperis lia unua verko, li publikigis dek volumojn da noveloj kaj eseoj, nome: Tra la sankta Vojo, La animo de la Makedonia, Fajra tero (rakontoj pri Makedonia), Psalmoj pri la vivanta Dio (poemoj en prozo), Unu printempa nokto (rakontoj), Homp, naturo kaj Dio (eseoj), La eterna fabelo (novelo), La senmortulino (romano), Signaloj (eseoj), Ĉiutagaj mirakloj (eseoj), k. c. Iuj el liaj verkoj estas tradukitaj en Esperanto. Lia kolekto „Ĉiutagaj mirakloj“ estas premiita en la literatura konkurso de la Bulgara instruista federacio.

L. Grin.

Sur la duonruinigitaj ŝtupoj de moskeo sidis almozetanto-blindulo kaj minore kantis malgajan kanton. Sidinta proksime, mi priatentis tiujn senbruaĵajn lamentojn de unu forpasinta vivo. La almozetanto komprenis, ke proksime de li sidas homo kaj lia voĉo iom post iom eksilentis kiel kordo de foriĝanta violono. Mi ĝemis, enpensinta pri la sorto de tiuj forlasitaj kaj suferantaj homoj.

— Kial vi ĝemas, kara filo? — min demandis la maljunulo, turnante sian vizaĝon al mi kaj direktante senvivan rigardon al la foro.

— Pro la suferantoj sur la tero, kara maljunulo, — mi respondis al li.

Sur la vizaĝo de la maljunulo aperis rideto kaj li tuj respondis:

— Alaho estas bona kaj kompatema kaj tial per la suferoj li instruas al la homoj prudenton, kara filo!

— De kie vi scias tion?

— Mi vivis multe kaj multon mi lernis de la vivo. Venu proksime al mi kaj mi rakontos ion al vi. Multajn fojojn mi vidis la morton per miaj okuloj, multajn fojojn mi ĝin vokis, sed ĝi ne venas, kiam oni ĝin vokas. Mi aŭdis, ke la homoj lernas skribadon kaj prudenton en lernejo, sed tio, kion al ni instruas la vivo, estas plej bona kaj plej utila.

— Kial vi opinias tiel?



Georgi Tomalevski

— Ĉar mi vidis multajn homojn, kiuj scias la arton skribi kaj legi, sed ne scias la plej simplan aferon, kiun la homo povas ellerni eĉ se li nur sidas en la dezerto kaj observas ĝian silenton. Ĉu vi scias, kio kaŝiĝas en la dezerto? Tiuj, kiuj ne povas lerni el la silento de la dezerto, Alaho ilin instruas per suferoj, por ke ilia animo maturiĝu. Aŭskultu — daŭrigis kante la maljunulo — mi rakontos al vi pri homo, kiu per la angoro ellernis la grandan prudenton.

La almozulo fermis siajn estingiĝintajn okulojn kaj ekparolis mallaŭte:

— En nia lando estis fama kaj riĉa homo, nomata Selim. Li estis plej kuraĝa kaj plej sperta el la kamelkondukistoj, kiu sentime travagis la tutan Nefud. Ĉu vi scias, kara filo? Nefud estas granda, danĝera kaj potenca dezerto. Pri ĝi oni parolas, ke ĝi estas senfina. Selim estis kruda homo, kiu ne komprenis pri amo kaj kompatato. Li estis nur justa. Por li Alaho estis nur justo kaj leĝo.

Kiam oni devis prijuĝi juste, la vorto de Selim estis por la kamelista vilaĝo leĝo, kiun nenju povis rompi. Sed se oni devis fari kompaton kaj pardonon, Selim estis senvorta kiel ŝtono, ĉar li havis glacian koron. Ĉion ellernis Selim — unua en nia gento: la ventojn en la dezerto, la

alvenantajn de malproksime ventoturnojn kaj la batalon kontraŭ la leviginta en la ĉielo sablaro, — sed la amon li ne ellernis, ĉar li ne sciis kio estas domaĝo. Alaho lin ŝirmis kontraŭ la domaĝoj, sed iuj homoj nur en la domaĝoj akiras bonan koron.

Kiel homo ellernos, kio estas kompatato, se li neniam petis pri kompatato? Eble Selim al neniu faris malbonon, sed ankaŭ bonon li ne faris. Nek lia kamelo mortis, nek vojon en la dezerto li perdis, nek rabistoj lin atakis. Li ne vidis siajn sklavojn morti de malamika rapiro. Mi estis servisto en la domo kaj mi konis lian koron pli bone ol ĉiu ajn.

Foje Selim sidis, kiel ĉiam severa kaj silenta, sub la ombro de arbo kaj rigardis al Nefud. Mi staris proksime de li. Al ni proksimiĝis Adem, la plej maljuna homo en la vilaĝo, kiun ĉiuj estimis, kaj, salutinte, li ekparolis zorgoplene:

— S-ro Selim, mi vidis vian filinon Zinnet. Ŝi marŝis sola. Ne plaĉis al mi la fraŭlino. Ŝiaj okuloj estingiĝas kaj ŝia juneco subiras antaŭtempe. Kial povas esti malgajaj la okuloj de juna fraŭlino? — mi diris al mi. — Kaj antaŭe ŝi estis kiel birdo!

En la okuloj de Selim ekbrilis fulmo. Kolerego trakuris tra lia vizaĝo kaj super liaj brovoj ensulkiĝis grimaco.

— Peko estas ĉi tio, s-ro Selim, — daŭrigis kuraĝe la maljuna Adem, kiu, pro sia prudento kaj aĝo, sola kuraĝis paroli tiel. — Ĉu vi ne vidas, ke turmento mordas la koron kaj venenas la vivon de via bela ido?

— Ne zorgu pri fremdaj aferoj, s-ro Adem! — respondis abrupte kaj malvarme Selim. — Mi scias pli bone ol vi, kio estas justa kaj kio ne.

— La justecon vi scias, s-ro Selim, sed kompaton vi ne havas, kaj sen kompatato la justeco similas senakvajn tagojn, kiam oni mortas en la varmeĝo de la tagmezo. Vi kolerigos Alahon, sinjoro, ĉar la Profeto en la sankta Korano parolas pri amo. Rememoru tion!

Selim lin ekrigardis per sia malvarma rigardo kaj ree turnis siajn okulojn al la dezerto, kiu kuŝis sternita antaŭ li.

— Deknaŭ jarojn havas Zinnet, sinjoro,

— diris Adem foririnte, — ĉu vi ne scias, kio okazas en la koro de fraŭlino, kiam ŝi fariĝas deknaŭjara?

El la senfina foro de Nefud kvazaŭ ekrigardis la malhelaj okuloj de Zinnet, sed la patro restis ĉiam tiel severa kaj senindulga, kiel antaŭe.

La fraŭlino amis fremdulon. Li ne estis naskita en nia lando. Li venis de malproksime. Neniu ĝis tiam vekis amon en ŝia koro, sed Selim ne volis doni sian idon al fremdulo. Plu bone Alaho ŝin voku ĉe Sin, ol Selim faru tion, kio ne estis laŭ lia volo.

Ne estis malbona homo la fremdulo. Krom tio li estis juna kaj brava. Li havis kvietajn, kompatemajn okulojn kaj fortajn muskolojn. Sur sia kamelo li portis malgrandajn, bele ornamitajn tapiŝojn kaj mirinde belajn vazojn, kiujn li mem ornamis per belaj ornamaĵoj. Iam oni lin aŭdis ludi nekonatan minoran melodion, plenan de amo. Ĉies koroj tuŝiĝis, aŭdinte tiun melodion en la nokta silento, multaj okuloj ekrigardis el malantaŭ la kurtenoj de la blankaj domoj de la vilaĝo, multaj maljunaj kaj spertaj homoj lin admiradis, kiam ili lin aŭskultis klarigadi la tekstojn de la sankta Korano — kvazaŭ la Profeto mem parolis al ili.

Foje, kiam li pretiĝis vojaĝi, li vidis Zinnet apud la moskeo. Tiam estis tago de la granda festo, sed ĝi estis nenio, kompare al la festo, kiu ekestis en li, ĉar de post la momento, kiam li vidis ŝiajn okulojn, en lia koro ekfloris granda floro de amo al la tuta mondo.

R. ANDREEVA

La bulgarino en la batalo por nia naciliberiga movado

La 3-an de marto, festante la nacian liberigon de nia lando, ni ne povas forgesi tiun grandiozan batalon de la tuta bulgara popolo por la sendependado. Ni ne povas ne rememori kun timestimo pri la brila ekzemplo de la konataj kaj nekonataj heroinoj, kiuj diversmaniere partoprenis tiun ĉi sanktan batalon.

Se la franca popolo fieras pri sia he-

— Kial vi makulas la familion de via patro? — demandis foje Selim.

— Mortigu min, kara paĉjo, sed mi povas fari nenion kontraŭ la volo de mia koro — respondis plene la fraŭlino.

En ŝiaj grandaj okuloj kuŝis plendo, sed ĝi ne povis degeli la koron de Selim — senkompata kaj severa.

De post tiu tago, la plej bela fraŭlino en la kamelista vilaĝo komencis velki. Fermata en la mallumaj ĉambroj de sia gepatra domo, observata de la perfidaj okuloj de dungitoj, ŝi pereadis en sklaveco.

Foje Selim devis vojaĝi malproksimen. Kiel gardiston de Zinnet li oticigis la severan kaj malican sklavon Kadim, kiu ŝin gardis tage kaj nokte.

Longe vojaĝis Selim tra la vasta kaj varmega Nefud. Vespere, kiam la suno subiris, li haltigadis la kamelojn, sternadis sur la sablon bele ornamitan tapiŝon, kaj genufleksite, kiel decas al ortodoksano, li dankadis al la Ĉiopova pro la forpasinta tago. Li dormis en tendo apud la genufleksigintaj kameloj kaj frumatene, ĝis kiam la ĉiela okulo ankoraŭ ne malfermiĝis, li ree ekiradis la vojon.

En la dekdua tago de la vojaĝo, Selim komprenis, ke eraris la vojon. Atendante atingi konatan oazon, li ŝin trovis sur nekonata loko. Sovaĝaj dezertaj herboj baris lian vojon. La koro de Selim konfuziĝis, li vokis siajn servantojn kaj konsiliĝis kun ili, sed neniu povis diri ion utilan, kio helpus lin trovi la vojon.

(Daŭrigota)

roino Jeanne d'Arc, ankaŭ ni devas fieri pri la sindonema kaj kuraĝa batalo de niaj heroinoj, kiuj partoprenis la liberigan movadon ne individue, sed amase kaj vaste.

Kvieta, modesta, dediĉita tute al sia hejmo, fidela kaj obeema, la bulgarino dum kvin-jarcenta nigra sklaveco vivis kun la malĝojo de la jugo kaj estis ĉiam

apud siaj filoj, kiuj fordonadis sian vivon por la kara libero.

Sub la funebro de la nigra jugo, konscia pri sia devo al la sklavigitaj fratoj, ŝi flustris al kreskantaj idoj „fabelojn pri famaj momentoj kaj kantojn pri novaj turmentoj“. Kun dolor-premita koro antaŭ neeviteblaj sanktaj viktimoj, ŝi revis vidi siajn infanojn en aŭreolo de herooj, defendantaj la popolon kaj la liberon de la patrujo. Tie ŝi lulkantis al siaj etuloj:

Dormu, mia infaneto,

Vi estiĝos juna bandano,
Vi estiĝos fama hetmano...
Dormu, mia reĝo montara!

Jen estas la revo de l' bulgara patrino: juna hetmano, montara reĝo. Ŝi naskis kaj kreskigis heroojn kiel Levski, Botev, St. Karaĝa, Haĝi-Dimitar, Filip-Totju, Rakovski kaj multaj aliaj.

Brilan respeguliĝon de la naciaj bataloj oni trovas en niaj popolaj kantoj, en kiuj kune kun la viro, la „hajduto“, elstaras ankaŭ la figuroj de bulgaraj heroinoj — hajdutinoj — Bojka Vojvoda, Pena Hajdutka, Irma Vojvoda, Janka, Stojana Hajdutka kaj aliaj, kiuj ne estas legendaj figuroj, sed vivaj, efektivaj, el sango kaj karno, elkreskintaj el la tiama bulgara realeco.

Dume la bulgaraj hajdutoj agadis neorganizite, unuope, instigataj de sento kaj vengemo pro makulita honoro, depost 1860. la bulgarino jam viciĝas en la movadon por naciliberiga batalo kaj eniras la kolonojn de la bulgaraj revoluciuloj, kun kiuj ŝi formas revoluciajn komitatojn, dissemantajn sur la tuta Bulglando.

Kiel tipaj figuroj dum la lasta epoko de nia jugo elstaras avino Tonka, Rajna pop Georgieva, kaj kune kun ili ankoraŭ multaj konataj aŭ nekonataj heroinoj, kiuj kun pafiloj en manoj batalis sindoneme por la libero. Fama kaj neforge-

sebla restos la taĉmento de la 65 virgulinaj kaj junedzinoj el Peruŝtica.

Avino Tonka donis imitindan ekzemplon. Patrino-revoluciulino, ŝi kun rideto sur buŝo kaj floroj en mano adiaŭas kun sia filo, iranta al ekzilo. Ŝi diris al li: „Kvar filojn mi havas, ankaŭ ilin mi oferos por la kara libero“.

Krome, avino Tonka partoprenis ankaŭ veran batalon kune kun aliaj virinoj el Ruse, kaj prizorgis la forsendon (trans Danubo en Rumanujon), de la malliberigitaj eksbatalantoj.

Tiel same elstaras antaŭ ni ankoraŭ pli reliefa, kiel viva figuro de la nacia revolucio, la vizaĝo de Rajna pop Georgieva. — Instruistino, ŝi ne nur brodis la revolucian standardon kun flamaj vortoj: „Liberon aŭ morton“ — sed flirtigis ĝin kaj ekkondukis la batalantojn de Panagjuriŝte, kun ilia estro Benkovski, al la batalkampo, ekkriinte per juneca entuziasmo: „Panjo, ni iros tien, de kie ni revenos liberaj.“ Aparte ŝia respondo antaŭ la juĝistoj kreskigas ŝin kiel konscienca heroino: „La amo al la patrujo instigis min brodi la standardon“.

Kortuŝa kaj granda estas ankaŭ la ekzemplo de la modesta sed heroa patrino el Gabrovo, prezidantino de la tiea societo. Ŝi forlasis sian mortantan idon kun la vortoj: „Dio prizorgu la mortinton, mi plenumos la devon al la vivaj batalantoj. Estas por mi tempo priplorilin.“ Ŝi alportis nutraĵon kaj vestojn al la bulgaraj batalantaj revoluciuloj kaj per tio montris, ke la patrino de la bulgarino etendiĝas trans la sojlo de ŝia familio.

Hodiaŭ, kiam ni travivas subliman historian momenton, la sinofero de tiaj bravaj bulgaraj heroinoj montriĝas ankoraŭ pli nobla. Ĝi devas fariĝi nia standardo, per kiu ni elforĝos pli helan estontecon por nia popolo, per kiu ni gardos niĝan liberon kaj sendependon, akiritajn dank' al la ofero de tiom da sanktaj viktimoj kaj herooj.

Libere tradukis; Iv. Magdin

NIKOLAJ IL, IKONOMOV*)

K O N F E S O

(El la kolekto „Rakontoj kaj skizoj“ I parto).

Al sia edzino tutkore dediĉas

La tradukinto

Mi ne plu amas lin. Ĉu viro estas tio? Ĉiam delikata kaj karesema!

Tiom da tempo pasis de kiam ni geedziĝis, kaj li ankoraŭ ne manifestiĝis kiel viro, kiu devas regi, ordoni kaj komandi.

Mi elkreskis ĉe panjo kaj paĉjo meze de plezuroj kaj karesoj.

De la edzeco mi atendis ŝanĝon en la vivo. En la edzo mi serĉis potenculon, seriozan kaj severan.

Kaj mia Ivanĉjo ĝis hodiaŭ ĉiam ankoraŭ petas permeson, kiam li kisos min. Poste, li ludas kun mi, kvazaŭ kun papilio, genufleksas antaŭ miaj paŝoj, rigardas min sindone en la okulojn kaj ĉiam tagmeze alportas al mi plej belajn florojn.

*) Nikolaj Iliev IKONOMOV estas konata ĉe-furba advokato. Do profesie ne literaturisto, li tamen estas konata al nia publiko per multaj literaturaj verkoj: Rakontoj kaj skizoj, La Aventuroj de la avina koketo-porinfana, Dediĉoj, Humora historio de Razgrad, Temido (humorajaro), El la notoj de l'advokato, Unu vivo, La tri domaguloj, Por miaj amiketoj, lam kaj nun (versajoj) k. a.

Ĉiuj verkoj de s-ro Ikonov aperigas maloftan observemon, spritecon, analizkapablon de l'homa animo kaj bonstilecon. Lia kolekto „Rakontoj kaj skizoj“ estas galerio de portretoj kaj eventoj—kolora bildo de l'vivo. Ni donas tie ĉi unu el ili, nome „KONFESO“-n — karakterizo de l'nuntempa virino.

Notinde estas, ke s-ro Ikonov estas granda amiko de Esperanto. Intervjuante lin, mi aŭdis jenon:

„Finstudinte la universitaton, mi forgesis eĉ la malmulton, kion mi estis lerninta de la franca lingvo en la gimnazio. Sed mi komprenis, ke sen la scio de lingvoj, homo kiel mi ne povas fari al si vojon en la vivo. Kaj mi eklernis en mia libera tempo dum tutaj sep jaroj. Tiujn ĉi mi nomas „moratoriaj“-nevivitaj jaroj, ĉar mi ne konis ripozon. Mi ellernis, ĝis kiom ili estis necesaj al mi, la francan, germanan, anglan kaj italan lingvojn. Mi komprenas ankaŭ hispanan kaj turkan, parte latinan. SED MI HAVAS ANKORAŬ UNU NEATINGITAN IDEALON: ellerni grekan kaj ESPERANTON. Mi estas jam 55-jara, sed mi ne perdas la esperon. Ĉu ne la rusa verkisto Krilov je 80-jaraĝo ellernis la latinan!“

I. H. K.

Li parolas al mi plej varmajn kaj delikatajn vortojn, ke li amas min, ke li restos al mi fidela ĝis la tombo kaj, malgraŭ tio, li fariĝis al mi terure teda kaj enuiga.

Alie, li estas ekstreme bona, amema, bela, saĝa kaj bonega edzo. Oni plialtiĝis lian postenon pro manifestitaj kapabloj en la ŝtatservo. Kaj lia kaj mia bonstatoj estas sufiĉaj por vivi plej larĝe.

Vi scias, ke ni aĉetis al ni eĉ luksan aŭtomobilon.

Sed mi ne estas kontenta. Ivanĉjo ne estas edzo por mi.

Ofte mi superverŝas min per larmoj. Mia ploro transformiĝas en histeria ploro. Li ne povis kompreni, kion mi serĉis en li, kian edzon mi deziris. Kaj eĉ kiam mi ekvolas intence lin nervigi kaj diras al li iun akran vorton, Ivanĉjo restas ĉiam tiel kvietaj kaj delikata. Li daŭrigas min karesi kaj nomi „mia eta katido“.

Mi ne povas plu elporti tian vivon. Al mi tedis!

Antaŭhieraŭ Ivanĉjo revenis hejmen denove ĝoja kaj kontenta, alportis al mi bukedon de blankaj rozoj kaj denove petis permeson por kisi min.

Mi ĵetis min je lia kolo kaj ekploregis.

„Ho, Ivanĉjo, sufiĉas tiom da delikataĵoj. Estu viro, regu super mi, insultu min, frapu min, batu min eĉ, por ke mi amu vin!“

Ivanĉjo ree ne komprenis min. Li supozis, ke mi ŝercas kaj komencis ridi kaj min karesi.

Post tio mi forlasis la domon kaj revenis ĉe mia patrino. Ivanĉjo venis petante de mi pardonon, se li iel ofendis min.

Sed mi decidis jam senrevene maledziĝi!

Kun permeso de l'aŭtoro
el la bulgara tradukis:

Ivan H. Krestanov, L. K.

PANTEONO DE NIAJ MORTINTOJ**Literatura rememoro**

La Klubo de la bulgaraj verkistinoj aranĝis merkrede la 27-an de Majo en la salono de „Slavjanska beseda“, Sofia, literaturan rememoron pri siaj karaj mortintaj membrinoj. Subteni la spiritan ligon kun eminentaj foririntoj estas efektive unu en la multaj devoj, se ne la plej laŭdinda, de la verkisto kaj publicisto. Interalie la verkistino Vera Bojaĝieva — Fol parolis ankaŭ pri nia karmemora samideanino

Lidia Ŝiŝmanova.

Tiu ĉi, filino de la konata ukraina scienculo prof. Dragomanov, venis tre juna, jam en 1889, en Bulgarujon. La patrujo de ŝia edzo, la eminenta profesoro Dro Iv. D. Ŝiŝmanov, fariĝis ŝia dua patrolando. Ŝi profunde amis la bulgaran popolon kaj ĝis la fino de sia vivo ŝi restis fidela al ĝi. Ekkoninte la ecojn kaj la animon de la bulgaroj, ŝi ĉiamaniere rapidis helpi ilin, dividante iliajn ĝojojn kaj suferojn.

Lidia Ŝiŝmanova verkis interesajn kritikajn stu-

dojn, en kiuj elmontriĝis ŝia riĉa kulturo, teatrajn kritikaĵojn, artikolojn de societa karaktero, tre interesajn kaj ĉiam aktualajn. Legindaj estas ŝiaj memuaroj, penetritaj de eleganta humoro, en kiuj la foririnta verkistino pentras al ni la vivmanieron en Bulgarujo antaŭ 40 jaroj, la tutan epokon, precize, forloge, kun subtila observemo.

Lidia Ŝiŝmanova estis tre ŝatata vivkamaradino de nia karmemora scienculo kaj samideano Dro Ŝiŝmanov, universitata profesoro kaj eksministro, kaj lia bona helpantino en liaj literaturaj laboroj. Apenaŭ ekzistas iu el niaj samtempuloj, kiu ne konas tiun malofte kulturan paron.

Samkiel ŝia edzo, ŝi volonte lernis kaj sentime parolis nian internacian lingvon, eĉ partoprenis, kiel delegitino por Bulgarujo, en la XVI Universala kongreso de Esperanto en Vieno 1924. Ĝis sia morto ŝi restis fidela al nia movado.

Ni estu dankaj pro ŝia talento, laboro kaj sindono kaj bondeziru, ke ŝia nomo eterniĝu en la kultura historio de nia patrolando.

I. H. K.

Reprezentado de Bulgarujo je universalaj kongresoj de Esperanto

En la lasta n-ro 3—4 de „B. E.“ estas *erare* dirite, ke bulgara samideano partoprenis en la I Universala kongreso de esp. en Bulonjo 1905. Bedaŭrinde tiun epokfarantan tutmondan renkonton, kiam por la unua fojo nia kara lingvo ankaŭ praktike pruvis sian vivkapablon, ĉeestis neniu bulgaro.

Unuan fojon Bulgarujo estis reprezentita (neoficiale) je la II Universala kongreso de Esperanto en Genevo 1906 per s-ro Stefan At. Uzunov el Rusĉuk, tiam studento tie, nun direktoro de la Doganejo en Sofia. Per li nia Majstro esprimis simpatian al la bulgaraj esperantistoj per jena skribaĵo:

„Al la bulgaraj esperantistoj mi sendas koran saluton.

Genevo, 30. VIII. 06. L. Zamenhof“

Duan fojon nia patrolando estis reprezentita (ankaŭ neoficiale) je la IV Univ.

kongreso de esp. en Dresdno 1908 per Ĥristo Ĥaralambev el Tirnovo, mortpafita en la Balkana milito 1912.

Trian fojon nia lando estis reprezentita (ankaŭ neoficiale) je la VII Universala kongreso de esp. en Antverpeno 1911, per s-ro Penko Stoev el Trojan, nun pensiulo en Plovdiv.

Kvaran fojon Bulgarujo estis reprezentita — *por la unua fojo ankaŭ oficiale* de la Ministerio de publika instruado (subskribis Ministro S. S. Bobĉev) — je la VIII Universala kaj jubilea kongreso de esp. en Krakovo 1912 per s-ro Ivan H. Kreŝtanov el Pirdop, tiam studento de filologio en Sofia. La bulgara delegito estis je aŭdienco ĉe D-ro Zamenhof, kiu sendis jenan propramanan saluton:

„Al la Bulgara Esperantista Societo mi transsendas per sinjoro Kreŝtanov mian koran saluton.

Krakovo, 11. VIII. 1912. L. Zamenhof“

Kvinan fojon nia lando estis reprezentita je la IX Universala kongreso de esp. en Berno 1913 per s-ro Iv. H. Krestanov, tiam studento en Dijon, Francujo. Nun por tria kaj lasta fojo nia karmemora Majstro sendis saluton al la bulgaraj esperantistoj, kiujn li tre ŝatis.

Sesan fojon — je la X Univ. kongreso en Parizo 1914, por la dua fojo *oficiale*, de la Ministerio de eksterlandaj aferoj (subskribis ĉefministro d-ro V. Radoslavov), per s-ro Iv. H. Krestanov, tiam studento en Grenoble. La kongreso estis malfermita kaj tuj fermita de Generalo Sébert, pro la samtaga proklamo de ĝenerala mobilizado en Francujo... eksplodo de mondmilito.

Sepan fojon — je la XII en Hago 1920, la unua postmilita kongreso, por la tria fojo *oficiale* — de la Ministerio de publika instruado (subskribis Ministro St. Omarĉevski), per S-ro Iv. H. Krestanov, tiam presataŝeo ĉe la Bulgara legacio en Berno. La favora raporto de la bulgara delegito al la Ministerio multe kontribuis por la oficiala enkonduko de Esperanto en la bulgarajn lernejojn.

Okan fojon — je la XIII en Prago 1921, per S-ro Panajot Kolev, oficisto en Sofia.

Naŭan fojon — je la XIV en Helsinki 1922, *oficiale* de la Ministerio de publika instruado, per S-ro Krum Mlaĝov el Dupnica, nun tabak-eksperto en Sofia.

Dekan fojon — je la XV en Nurnbergo 1923, *oficiale* de la Bulgara registaro, per Dro W. Kaufmann, bulgara ĝenerala konsulo en Dresdeno, kies multaplaŭdatan germanlingvan paroladon tradukis Iv. H. Krestanov, tiam sekretario de la Bulgara ĝenerala konsulejo en Dresden. Estis publika invito, ke la venonta Universala kongreso okazu en Sofia.

Je la XVI en Vieno 1924 estis delegitino S-ino Lidia Ŝiŝmanova, je la XVII en Ĝenevo 1925 estis delegito S-ro Kiril Georgiev el Sofia, je la XVIII en Edin-

burgo 1926 — S-ino Zlatka Apostolovska el Varna, je la XIX en Danzigo 1927 — S-ro Radoslav Triĉkov el Vraca, je la XX en Antverpeno 1928 — S-ro Serafim Vitanov el Dupnica, je la XXI en Budapeŝto 1929 — S-ro Ilia Silvestriev, rez. kolonelo el Ŝumen, je la XXII en Oksfordo 1930 kaj je la XXVI en Stokholmo 1934 — S-ro Petro Pamporov, oficisto en Sofia, je la XXVII en Romo 1935 — S-ro Ivan Kotov, bankoficisto en Rusĉuk, je la XXVIII en Vieno 1936 estis oficiala delegito, sed lia nomo estas nenie menciita.

Je la XXIX Ora-jubilea kongreso en Varsovio 1937, *oficiale* de la Ministerio de publika instruado kaj de la Ministerio de komerco kaj laboro, per S-ro Ivan H. Krestanov, publicisto en Sofia vojaĝanta al la Nordaj landoj. En tiu solena kongreso du bulgaraj samideanoj — S-roj Krestanov kaj Nenkov — estis honoritaj per oraj esp. steloj kun diplomoj kiel veteranoj pro fideleco al la movado de post 1905.

Je la XXX en Londono 1938 Bulgarujo estis reprezentita per Dro Stojan Guĝev, profesoro en la Muzika akademio en Sofia, kaj je la XXXI en Berno 1939 — per F-ino Bogdana Popova, oficistino en Sofia.

Do, el ĉiuj 31 universalaj kongresoj esp. Bulgarujo estis reprezentita en 22 kongresoj.

Dum la diversaj kongresoj universalaj, kiujn mi havis la feliĉon kaj plezuron ĉeesti, mi persone konatiĝis kaj parolis kun la tuta familio Zamenhof — gepatroj, gefiloj, genepoj, kun la fratoj kaj bofrato de D-ro Zamenhof kaj kun preskaŭ ĉiuj famaj esperantistoj kaj sukcesis akiri iliajn aŭtografojn kaj skribajn salutojn al la bulgaraj esperantistoj en aparta libreto.

Neforgeseblaj restos por ĉiam en mia memoro la belaj tagoj pasigitaj en tiu frata medio. Ho, ĉu iam denove mi travivos ilin? Utinam!

I. H. K.

NIA VIVO

ENLANDA KRONIKO

Sofia. La esperanto-movado en Sofia ne ĉesas. Preskaŭ ĉiusemajne la gesamideanoj organizas ekskursojn al Vitoŝa, Ljulin, stacio Iskar kaj alie. Dum la tuta ekskursita tago ili parolas kaj kantas esperante. En la lasta ekskurso partoprenis: Saŝa kaj Ivan Esperov kun sia knabeto,



Esperantistoj el Sofia ekskursas al montaro Vitoŝa.

Dimitar G. Ivanov, Lada Makedonska, Nikola Karbanov, Todor Parvanov, Georgi Ikonov, Sneĵanka Makedonska kaj aliaj. Per la ekskursoj ili pli fortigos la esp. movadon.

Ivan Esperov kaj Dimitar G. Ivanov kolektas la abonkotizojn por „B. E.“ kaj disvendas la propagandan libron „En la ombroj de la piramidoj“ de Iv. Iliev. Ĝis nun ili abonigis 112 samideanoj. La kolektato de abonkotizoj daŭras.

Dim. G. Ivanov

Sofia. Esperanta amuzo en la ŝtata instituto por blindaj geknaboj. La 14-an de junio, en la Ŝtata instituto por blindaj geknaboj, okaze de la fino de la lerna jaro, okazis esperanta amuzo, plenumita ekskluzive de blindaj gesamideanoj. La amuzon ĉeestis kelkaj pioniroj de la esperantismo en Bulgarujo: sinjoro Dimo Kolev, sinjoro Stefan Nenkov kaj aliaj. Inter la ĉeestantoj rimarkigis ankaŭ kelkaj sofiaj pli junaj agemaj samideanoj: Ivan Esperov, Dimitar G. Ivanov kaj aliaj. La amuzo estis malfermita kun parolado en Esperanto de sinjoro Dimo Kolev, kiu

salutis la ĉeestantojn kaj per kuraĝigaj vortoj atentigis pri la progreso de Esperanto kaj ĝia sukceso en la estonteco. Post la parolado eksonis „La espero“, kantita de blindula ĥoro. Ĉiuj ĉeestantoj stariĝis kaj auskultis ĝin pie. Sekvis kantoj kaj deklamoj en Esperanto, plenumitaj de la blindaj gejunuloj: Verka Cvetanova, Marijka Marova, Kera Borisova, Marijka Todorova, Todorka Slavova, Verka Mitova, Minibe Alieva, Vasil Matev k. a. La ĥoro plenumis kelkajn naciajn kantojn kaj la programo finiĝis per la teatraĵo: „Forlasita“ de Cvetan Ŝiŝkov.

Je la fino, sinjoro Dimo Kolev dankis la partoprenantojn pro ilia fervoro kaj donacis insignojn al la distingigintaj geartistoj. Je la nomo de la sofiaj esperantistoj sinjoro Iv. Esperov kaj Dim. Ivanov salutis la partoprenantojn de la amuzo, dirante po kelkaj instigaj kaj kuraĝigaj vortoj. Fine paroladis sinjoro Stefan Nenkov, unu el la plej malnovaj blindaj esperantistoj en Bulgarujo.

Nikola Pangelov.

Plovdiv. La atingita rezulto de niaj klopodoj denove entuziasmigis niajn gesojn por plua laboro. Ĝis nun ni abonigis pli ol 80 (okdek) gesanoj por nia ŝatata revuo „B. E-isto“. Tio ĉi estas rezulto nur sopirata dum pasintaj jaroj, sed nun ĝojige realigita.

Dank' al fervoreco kaj plane dividita laboro inter la gesamideanoj en nia urbo, nek unu s-ano restis neinvitita. Al kelkaj junaj esperantistinoj ni ŝuldas multon pro ilia laŭdinda adago.

Ankaŭ unu notinda fakto ĝojigas nin dum nia laboro.

Kutime, kiam oni estas invitataj por aboni al iu ajn gazeto, revuo, jurnalo k. a. ordinare oni priparolas la enhavon, kio plaĉas kaj kio ne. Do, tiel ni faris senintence neoficialan enketon inter la legantoj. La opinioj estas ĝojigaj kaj kuraĝigaj: nia revuo iras veran kaj bonan vojon; la enhavo estas varia kaj leginda, kaj preskaŭ ĉiuj ne kaŝis sian admiron al la ĉef-artikoloj de nia redaktoro. La legantoj nur bedaŭras,

ke tre malofte aperas la revuo. Tio pravas, ke ju-pli-bona kaj interesa estas la revuo, des-pli longa ŝajnas la tempo ĝis la riveco de alia n-ro. Ni konsideru tion!

Paralele kun la kolektado de abonoj ni disvastigas ankaŭ la libron: „Sub la ombro de la piramidoj“ de s-ano Iv. Iliev. La libro faras bonan propagandon por nia lingvo.

La supra agad-maniero evidente pravas al ni lastan fojon, ke nur konkreta, laŭ-plana, kvankam senbrua, sed senĉesa laboro, sendepende la kondiĉojn, povus atingi kaj realigi antaŭstarantajn taskojn hodiaŭ, celon sopiratan — morgaŭ.

I. B-v

Harmanli. En nia urbo ekzistas bona intereso al Esperanto. Inter la junuloj ekzistas jam tri grupetoj, kiuj lernas la internacian lingvon. Oni jam decidis korespondi, por perfektigi en la lingvo. Por plua laboro estas necesa impulso de ekstere.

Kumanovo. En Kumanovo nia kara lingvo trovas bonan grundon. Multaj junuloj progresas en la lernado. Ili jam sufiĉe bone parolas. Kelkaj korespondas kun enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj. La ricevita en la urbo Esperanto-literaturo tuj disvendiĝas. La nombro de niaj amikoj pligrandiĝas konstante.

Br. Totabitov

Funebro. Kun kordoloro ni sciigas niajn legantojn pri la morto de nia fervora kaj tre ŝatata samideano *Borislav D. Milĉev* el Vraca, apenaŭ 32-jara. La enterigo okazis la 24-an de aprilo n. j. Liaj esperantistaj amikoj el Vraca tiu-okaze eldonis kortuŝan nekrologon. Li ripozu en paco. Ni esprimas niajn kondolencojn al la funebranta familio.

v. Borima (Trojan). La malnovaj esperantistoj laboras senbrue sed intense kaj kun kredo al la estonteco. Kelkaj lernantoj el la gimnazio de Trojan lernas diligente Esperanton kaj jam tre progresis. Ni sendis 7 jarabonojn por *Bulgara Esperantisto*. Iuj el ni partoprenas la Albumon-adresaron de Dim. Ivanov. Ni intencas fari baldaŭ ekskurson al la proksima Balkano. *Hr. Vodeničarov*

Tra Orienta Makedonio vojaĝis kaj propagandis en junio nia samideano Iv. H. Krestanov. Li vizitis Demir-Ĥisar, Seres, Drama, Kavala kaj insulon Thasos. Ĉie li trovis esperantistojn. Notinde estas, ke la distriktestro de Kavala estas nia s-ano Stefan Radev, ekssekretario de B. E. A.

Abonantoj de „Bulgara Esperantisto“, kiuj ne ricevas ĝin regule, sciigu per poŝtkarto al Dimitar G. Ivanov, str. „Lozengrad“ 10 — Sofia VIII. Li ekspedos la nericevitajn ekzemplerojn.

VIZITU BULGARUJON!

La bulgara bordo de la Nigra maro

Radio-prelego de K. D.

Dum la lastaj jaroj, la urboj sur la bulgara marbordo disvolviĝis kiel gravaj centroj por somerripozo. Laŭ klimato, geografia situo, vastaj strandoj kun etgrena sablo, instaloj, malkara vivo k. a., ili estas konsiderataj kiel la plej bonaj sur la Balkana duoninsulo; kelkaj eĉ konkuras al la okcidenteŭropaj.

Unuan lokon inter ili okupas Varna. Koketa urbo, banejoj kun varma kal malvarma akvo, mirinda parko por promeno kaj ripozo, kilometrojn longa strando kun ore briletanta sablo kaj glata mara fundo, tre modera klimato — tagoj sen varme-

goj, noktoj agrable malvarmetaj, belega marbordo dronanta en verdaĵo — jen tio estas Varna, kiu meritplene portas la nomon „Reĝino de la Nigra maro“.

La sezono inter la unua de majo kaj unua de julio estas por gastoj serĉantaj ripozon kaj trankvilon. Tio estas la sezono de fragoj, ĉerizoj, acidĉerizoj, kaj de diversaj aliaj fruktoj. La sezono inter la unua de julio ĝis la unua de septembro estas precipe por tiuj, kiuj serĉas la bruon kaj la plezuron. Kaj la aŭtuno estas sezono dum kiu ĉiu povas ligi la sunkuracadon kun la vinbera. Dum la

aŭtuno Varna proponas al siaj vizitantoj siajn plej bonkvalitajn vinberojn, konatajn en tuta Eŭropo.

La amuzoj kaj distroj dum la ĉefa sezono en Varna estas plej diversaj: ĉiutagaj tagmezaj kaj vesperaj koncertoj de militista muziko kaj ĝazo en la apudmara parko, muzikaj festoj en aŭgusto, ĉiutagaj spektakloj en la Urba Teatro de Varna, kinoteatroj sub la ĉielo, dancoj, baloj, veneciaj noktoj, konkursa elekto de Reĝino de la strando, de plej bela infano k. a.

Dum la sezono en Varna estas organizata internacia foiro-bazaro kaj vilaĝana agrikultura foiro. La lasta estas grandioza manifestacio de bulgaraj naciaj kostumoj, dancoj kaj muzikinstrumentoj.

La monaĥejo Sv. Konstantin, la palaco Eŭksinograd (somera restadejo de la Reĝo), la kaverna monaĥejo Alaĝa, ĉizita en abruptaj rokoj antaŭ 14 jarcentoj, Kamĉia — la rivero de abundaj akvolilioj — tio estas la pentrinda ĉirkaŭaĵo de Varna, kara ornamaĵo de ĝia reĝina krono.

La bulgara bordo de Nigra maro povas esti fiera ankaŭ per alia, ne malpli granda urbo — **Burgas**, situata en granda golfo. Grava komerca centro, Burgas posedas ĉiujn kondiĉojn de banloko: belegan parkon, vastan strandon kun sablo enhavanta feron — la sola fersablo de Nigra maro. Proksime de Burgas ŝprucas varmaj mineralfontoj, 41.5° C.

Aliaj vizitindaj urboj kaj vilaĝoj sur la Marbardo:

Sozopol — urbo ne konanta la kutiman bruon kaj posedanta kelkajn belajn strandojn.

Pomorie — urbo rimarkinda per siaj ŝlimbanoj, kuracantaj cent procente la reŭmatismen.

Nesebar — la plej antikva urbo de la Balkana duoninsulo, kun malnovaj preĝejoj kaj ruinoj datantaj de la sesa jarcento; situas sur insulo, kies ligo kun la kontinento estas mallarĝa strio da tero;

ŝirmita de la Balkano kontraŭ la ventoj, posedanta moderan klimaton kaj plej belan strandon. Nesebar altiras ĉiu somere milojn da vizitantoj.

Obzor — pentrinda vilaĝo, ĉirkaŭita de vastaj arbaroj. Apud ĝi troviĝas la ruinoj de granda roma templo, konstruita je la honoro de Jupitero.

Ahtopol — situata sur la ruinoj de la fama urbo Aghatopolis — la urbo de la amo. Distingiĝanta per siaj mirindaj strandoj kaj romantikaj rokoj, ĉirkaŭita je tri flankoj de montoj, Ahtopol estas vizitinda loko por ĉiu gasto de la mara bordo.

Ĉarmaj lokoj, belaj koketaj urbetoj, bordo de agrablaj klimataj kaj geografiaj kondiĉoj, bordo de popolo kun originalaj kutimoj, moroj kaj kostumoj, moderne aranĝitaj banejoj, komforto, distroj, piedpilkado teniso, akva sporto, bolanta vivo — ĉio, kion oni povas postuli de unuagrada banloko, kompletigas la belecon kaj la riĉaĵojn de la bulgara bordo de Nigra maro dum la somero.

La varmaj kaj malmarmaj banoj, farataj laŭ la kuracista ordono, kuracas: la raĥiton, iŝiason, reŭmatismen, kronikajn malsanojn de haŭto, ostoj, glandoj, malsanojn de seksorganoj ĉe la virinoj, anemion, senfortecon kaj aliajn.

Gvidata de la konata slava gastamo, Bulgarujo faros ĉiun eblan favoron al siaj vizitantoj: kvindek procentan rabaton ĉe la bulgaraj ŝtataj fervojoj, senpagan somersezonan vizon, strikte normigitajn prezojn en restoracioj, hoteloj, vilaoj, pensionoj kaj privataj domoj. En la urboj estas organizita regula veturado al la ĉirkaŭaĵoj, ĉiutagaj promenoj surmare per motorboatoj, ekskursoj al Konstantinoplo per luksaj vaporŝipoj k. t. p.

Ni invitas vin pasigi la someron sur tiu ĉi fabela marbordo, por bone ripozi, por refortigi vian korpon kaj spiriton. Viaj impresoj pri nia lando ĉarmigos longe viajn rememorojn.

La nova adreso de Bulgara Esperantisto:

Str. DENKOGLU 11 — Sofia

BIBLIOGRAFIO

Въ сѣнката на пирамидитѣ. — **En la ombro de la piramidoj.** Vojaĝnotoj el la proksima Oriento, de Ivan Iliev, kun antaŭparolo de Georgi Karaslavov, sub la redakto de Ivan Esperov, Sofia 1942, paĝoj 72, prezo 20 levoj. Havebla ĉe l'aŭtoro: ul. Graf Ignatiev 5 kaj ĉe Iv. D. Esperov, ul. Pirot 48, Sofia.

La aŭtoro travojaĝis en la antaŭvespero de la nuna milito la landojn de la proksima oriento: Turkujon, Sirion, Palestinon, Irakon, Egipton kaj Grekujon.

Dank' al la internacia lingvo kaj al sia granda observemo, li vidis, aŭdis kaj lernis multajn interesajn aferojn. Ilin li nature kaj intime rakontas al ni, ofte ligante kaj komparante la estintecon kun la estanteco.

La libro estas ilustrita kaj oni legas ĝin kun streĉo. Ni varme rekomendas ĝin al niaj gelegantoj ankaŭ kiel modelan priesperantan propagandilon bulgarlingvan.

I. H. K.

ESPERANTO-PERIODAĴOJ RICEVITAJ

Nia Parolilo, loka Esperanto-gazeto, organo de la esperantista klubo A. B. F. Redaktoro E. Ekström. Adreso: Linnegatan 38, Göteborg (Svedujo), n-ro 5, junio—julio 1942. Enhavas tre interesajn sciigojn pri la stato de nia movado en okupita kaj neokupita Francujo, en Brazilio, en Kroatujo, en Anglujo kaj en Svedujo. Kuraĝiga estas la komuniko pri la „grandioza kongresfesto en Boras“.

Hungara Heroldo, oficiala organo de la Hungara Esperanto-Federacio. Redaktoro Josefo Mihalik. Adreso: Reveszstr. 1., Sashalom, Hungarlando. n-ro 2, junio 1942. Enhavas inviton por la XVI-a hungarlanda Esperanto-kongreso, okazonta

la 15—16-an de aŭgusto kaj diversajn artikolojn pri Hungarujo.

Svenska Esperanto-tidningen. La Espero. Organo de la Sveda Esperanto-Federacio, red. Eva Tulin, adr. Box 698 Stockholm 1., Svedujo, n-ro 6, junio 1942. Enhavas kuraĝigajn informojn pri la Sveda nacia Esper.-kongreso en Boras, pri la stato de nia movado en Finnlando, k. c.

Cirkulero-sciigilo por anoj de la Hungarlanda katolika Esperanto-societo, Majo—Juno 1942. Adr.: Budapest V. Géza str. 4. Hungarujo.

Frateco, monata gazeto por frata vivo, Junio 1942. Adreso: At. Nikolov, Sevlievo, Bulgarujo.

DEZIRAS KORESPONDI:

S-ro Arne Petterson — Storgatan 8 *Oskarshamn* — Schweden — (Svedujo). Dez. korespondi pri literaturo kaj historio; intersanĝos p. m. kun seriozaj filatelitoj, precipe kun bulgaroj.

S-ro Lage Börje, Gröndalagatan 18 *Oskarshamn*, Svedujo.

S-ro Nils Samuelsson, Besvärgatan 11 *Oskarshamn*, Svedujo.

S-ro Rune Gustavsson, Box 30 *Ruda*, (K. B. J.)

S-ro Roy Jonsson, Kolberga, *Oskarshamn*

Svedujo.

S-ro Eric Sörensson, Box 255 *Trolhattan*, Svedujo.

S-ro Pragay Derso, (studento) Kalozsvar, Kalaŭz u. 21 *Magyarorszak*, Hungarujo.

S-ro Dimitar G. Ivanov (elektroteknikisto) 20 j. str. „Lozengrad“ 10, *Sofia VIII*. Deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

Petar V. Stanev, bul. „Vitoša“ 20, Sofia. Deziras korespondi kun fraŭlinoj el tuta Bulgarujo.

Tra Eŭropo per Esperanto

grandformata multilustrita verko kun interesaj vojaĝnotoj kaj impresoj dum 35-jara esp. vivo de Ivan H. Krestanov. Por antaŭpagintoj ĝi kostos nur 75 Levojn, poste duoble. La samaj ĝuos grandrabate la 2 verkojn: **Vortaro de esperanto** (gramatiko, esp.-bulgara kaj bulgara-esperanta partoj) kaj **Bulgara Antologio** (prozo kaj poezio kun fotoj — ambaŭ kune nur 110 Levojn. Mandu tuj ĉe l'aŭtoro:

Iv. H. Krestanov, ul. 6. Septemvri 2, Sofia (poŝt-ĉek-konto № 4591)